Augustin Wibbelt,

Antaŭprintempo

tradukita de Manfred Retzlaff

Ho, printempo kara,
Ĉu revenis vi?
Nur malmultan verdon
Vidas ĉie mi.

Sur la kamp' ankoraŭ
Kuŝas ĉie neĝ'.
Nur pasero kantas
Sola sur la heĝ'.

Kiu tie gapas
Tra la fum-aer'?
Estas vi! Ĝin scias
Ankaŭ la paser'.

Traduko de la Basgermana poemo "Vüör-Fröhjaohr" de Augustin Wibbelt *(∗1862-09-19 – †1947-09-14) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2012-07.*

Arg-596-1200 (2012-08-16 23:14:43)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poemon en la kajero "Kleine Westfälische Reihe", Nr. VI/12, eldonita en 1957 de la la eldonejoj "Aschendorffsche Verlagsbuchhandlung" kaj "Deutscher Heimatverlag Bielefeld-Bethel", komisie de la ligo "Westfälischer Heimatbund".